Usona solidara reto postulas finon de la ekonomia blokado.

Usono, 22 okt (RHK) En la usona urbo Minneapolis sesiis de la 19-a ?is la 21-a de oktobro la konferenco Reto Nacia de Solidareco al Kubo (NNOC) , kiu arigis pli ol 30 organiza?ojn kies celo estas, interalie, ?esigi la sie?on ekonomian, komercan kaj financan altruditan de Usono al Kubo kaj plibonigi la rilatojn inter la du landoj.

La fina deklaro de la renkontiĝo ratifas tiun ĉi celon afirmante la defendon de la suvereneco kaj la pretecon daŭre batali kontraŭ tiu agresema politiko en Usono mem.

Gail Walker, ekzekutiva direktorino de la organizo, precizigis al la informagentejo Prensa Latina, ke la grupo vojaĝos al Kubo la 17-an de novembro tra Toronto kaj revenos la 25-an, dato kiu koincidas kun la forpaso de la historia gvidanto de la kuba revolucio, Fidel Castro.

Ili aprobis la eniron de tri novaj organizaĵoj interesiĝintaj aliĝi al la reto, inter ili estas Witness for Peace, iniciato tutlanda; Autonomous University of Social Movement, situanta en Chicago; kaj la Detroit Association of Black Organizations (DABO).

Siaflanke, Miguel Fraga, unua sekretario de la kuba ambasado en Usono, dankis al

la amikoj de Kubo pro ties konstanta laboro kaj instigis ilin inviti siajn samlandanojn viziti la kariban insulo por konatiĝi kun ties realo.